

Henri Miéville
Claude Gacond, 72-a radioprelego, 1964.04.15 & 18

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri Henri Miéville. Vi aŭdas Claude Gacond.

Romandio ĵus perdis unu el siaj plej influaj kaj ŝatataj filozofoj. Henri Miéville estis unu el tiuj universitataj profesoroj, kies disĉiplaro ne nur konsistas el studintoj, sed el vasta publiko neuniversitata. Kiam gravaj demandoj estis submetitaj al la svisaj civitanoj (vi ne forgesu, ke en Svislando pli ol po dekfoje jare la civitanoj devas iri diri jes aŭ ne dum plej diversdemandaj balotoj), do mi diris, kiam gravaj demandoj estis submetitaj al la civitanoj, la universitata filozofo ne hezitis diskonigi sian vidpunkton per kuraĝaj kaj spirite sendependaj artikoloj verkitaj por divers-tendencaj gazetoj. Ofte dank'al tiuj kontribuoj la civitanoj konsciis pri la graveco de la ago baloti, pri la neceso ne nur defendi propran vidpunkton, sed ankaŭ provi kompreni tiun de la kontraŭulo.

Henri Miéville antaŭ ol ricevi la filozofian katedron en la universitato de Lausanne, instruis en Leysin, kaj poste en la Nova Lernejo en Chailly, en la Kolegio Vinet, en la Klasika Kolegio kaj en la Gimnazio en Lausanne. Multaj el liaj gelernantoj konservis luman rememoron de tiu profesoro, kiu (kaj mi citas unu el ili) « redonis al siaj gelernantoj kajerojn, kies marĝenoj estis kovritaj de lia fajna skribo : saĝaj rimarkoj, neniam malkuraĝigaj, sed meditigaj. » Alia studento diras : « Li estis nia filozofia instruisto en epoko, kiam la tentado pri naciismo kaj totalismo estis premiga. Ni aŭdas lin ankoraŭ, post tridek jaroj, nin averti kontraŭ la tro facila solvo, kiu troviĝas ĉe la emo je enkadriĝo. Kun tiu majstro, kiu preferis proponi modelojn, ol trudi solvojn, nia juneco akiris liberan kaj kuraĝan pensemon kaj iun aŭtonomecon. »

En kelkminuta prelego absolute ne eblas analizi la penson de filozofo kiel Henri Miéville. Mi nur citos kelkajn titolojn el liaj verkoj, por doni ideon de la varieco kaj aktualeco de la pritraktitaj temoj. Poste mi legos al vi kelkajn penso-riĉajn rimarkojn de tiu filozofo, kiu unue studis teologion kaj prezentis tezon pri *La filozofio de sinjoro Renouvier kaj la problemoj de la religia kono*. Samuel Gagnebin, kiu instruas en la svisa politeknika universitato en Zürich diras pri tiu tezo : « Ĝi estis por ni vera inico al serioza, metoda kaj efike atentema pensado. »

Henri Miéville estus povinta fariĝi merito-plena pastoro. Sed lia spirito estis tro liberema por sin ligi al doktrinaro, al eklezio. Li apartenis al generacio de junaj teologoj, kiuj pro sincereco rezignis pri la pastorado, por sin dediĉi al la instruado kaj filozofio.

La penso de Henri Miéville estas plej bone esprimita en du belaj libroj : *Vers une Philosophie de l'Esprit ou de la Totalité (Al filozofio de la Spirito aŭ de la Totaleco)* kaj *Condition de l'Homme (Homa kondiĉo)*, kiu aperis en 1959, do ĵus antaŭ kvin jaroj.

Inter la multnombraj gazetartikoloj verkitaj de Henri Miéville okaze de publikaj civitanaj debatoj ni citu *La civila servo kaj la defendo de la juro* (1920), *Armeo kaj polico* (1930), *Svislando kaj la kolektiva sekureco* (1938), *Koncerne la neceso antaŭan cenzuron, kiu nin minacas* (1941), *Ĉu povas ekzisti socia justeco ?* (1941), *Koncerne la opinion delikton kaj la presan liberecon* (1942), *Pri la militrifuzantoj en Svislando* (1943), *Pri la svisa neŭtraleco* (1944), *Libereco kaj demokratio* (1948). Kiel vi rimarkis aŭdante tiujn titolojn, tiu filozofo ne restis en sia faka mondo, en sia ebura turo, kiel diras la franclingvanoj, sed kontraŭe ne hezitis sin enmiksi en la surstratajn politikajn debatojn. Oni tiam komprenas la rolon, kiun povis ludi tiu universitata profesoro en demokrata landeto kiel Romandio.

Nun ni donu la parolon al tiu filozofo, kaj vi plian fojon komprenos, kial tiom da simplaj legantoj, kiuj neniam frekventis universitatajn filozofiajn kursojn, tamen povis trovi, en la verkoj de Henri Miéville, riĉigan kaj meditigan nutrandon.

Henri Miéville

Claude Gacond, 72-a radioprelego, 1964.04.15 & 18

« Nia pasia kaj perfortema epoko kondukas la spiritojn al fanatismo, diras Henri Miéville en *Kiel labori por la spirita unueco de la civito* ? kaj li daŭrigas : La fanatismo, kiu sin kredas forĝanto de la spirita unueco, kontraŭe estas ĝia plej granda malamiko. Estas fanatismo ekde la momento, kiam oni sin kredas rajtigita trudi sian vidpunkton aŭ sian kredon al aliulo, ilin prezentante kiel la eldiro de la absoluta kaj totala vero ekster kiu ne ekzistas savo. Tie estas manko de modesteco kaj mezuro. Ni certe havas la rajton kaj devon resti firmaj en la aĵoj, kiujn ni kredas veraj kaj justaj, sed ne fari de nia kredo normon de la vero por la aliaj, ĉar ni vidas la veron nur kiel en malhela spegulo, nekomplete kaj neperfekte, miksitan al erarigaj elementoj, tio eĉ kiam ni kredas posedi la esencaĵon, eĉ kaj ĉefe kiam temas pri religio. ».

Tiu diro de Henri Miéville en federacio de 25 preskaŭ sendependaj landetoj, kie kvar lingvoj estas parolataj kaj du grandaj religioj kaj plej diversaj politikaj kaj filozofiaj vidpunktoj alfrontiĝas, estas kiel paciga alvoko. Mia espero estas, ke foje la verkoj de Henri Miéville estos pere de esperanto disvastigataj en la tutan mondon. Ili ricevus de la esperantistaro certe varman akcepton, ĉar ili temas ĉefe pri la regado de nia propra spirito.

En nia epoko, kiu vidas tiom da ŝanĝoj mi ŝatas mediti la konstaton de Henri Miéville : « La fundamentaj bezonoj de la homa naturo tiel, kiel la normoj de la vero kaj bono ne ŝanĝiĝas, sed kiom da ŝanĝoj en la moroj kaj ideoj ! »

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond parolis pri Henri Miéville, filozofo kiu instruis en la universitato en Lausanne kaj mortis la 29-an de decembro 1963.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-